*En Zamenhofa Festo 2009 s-ro K. Maeno parolis:*

Estas la unua sperto por mi paroli en Esperanto antaŭ publiko. Mi parolu pri mia aŭtomobilo.

Antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj mi aĉetis mian ankoraŭ nun kondukatan aŭton: *Demio* de *Macuda*.

Ordinare, kiam oni aĉetas novan aŭton, oni oftege lavas kaj brosas ĝin por teni ĝin plejeble bela.

Tamen, kiam mi aĉetis nebrokantan, tute novan *Demio*-n, mi tuj komencis reformi la internon. Kompreneble mia edzino protestis kontraŭ mia reforma plano akre. Ŝajnis neeble konvinki ŝin. Post la ekstreme malfacila persvado mi formetis malantaŭajn seĝojn per instrumentaro, kaj plankis la vakan spacon per lignaj tabuloj, kaj faris loĝspacon, kie mi planis kuiri kaj dormi.

Mi ŝarĝis la aŭton per kuiriloj: portebla fornelo, poto, manĝilaro, kaj ceteraj. Krome, mi fiksis karenforman portilon sur la tegmenton por porti litaĵojn.

Kun tiamaniere reformita aŭto mi vojaĝis kune kun mia edzino tien kaj ĉi tien enlande dum dek jaroj.

Mi ankaŭ veturis fiŝi kun mia kamarado al riveroj kaj marbordoj. Sed ĝi estas jam alia parolo. Nu, mi finas mian parolon.

Dankon pro via atento

K. Maeno

Kirikae H. skribas: Mi elkore estimas karan s-inon Maeno, kiu komprenis kaj akceptis la viran romantikan revon fine, kuraĝe riskante difekti karegan aĉetaĵon. Sed kio estas la vira romantika revo? — Vago. Vagado ĝis la fin'. Viro ja estas *vagabond' de l' mondo.*